

*The*  
NORTH AMERICAN  
ESPERANTO REVIEW



**IN THIS ISSUE:**

Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation  
Word Building, Prefixes and Suffixes

**ESPERANTISTOJ LEGU:**

En Intereso de la Vero    *Letero de D-ro Ivo Lapenna*

**NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO**

Januaro - Februaro • 1956

## *The North American Esperanto Review*

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

*Addresses:* Subscriptions and bulk orders should be sent with payment to the Treasurer. Correspondence regarding circulation, including changes of address, etc., should be sent to the League Secretary. Send literary contributions, news items, announcements, etc. to the Editor: F. R. Carlson, 2116 North 35th St., Seattle 3, Washington.

*Deadlines:* The *Review* is placed in the mails about the fifteenth of every second month. Material for publication must be in the hands of the Editor no later than the fifteenth of the preceding month, except for last-minute news items, which will be accepted as late as possible.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *President:* John L. Lewine, 50 Overlook Terrace, New York 33, New York; *Vice-President:* James D. Sayers, RFD 2, Lillie, La.; *Secretary:* Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; *Treasurer:* Edward W. Pharo, Jr., 220 County Line Rd., Somerton 16, Pennsylvania.

*Membership Dues:* Regular Members, \$3.; Supporting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member, but receiving only one copy of publications, etc., \$4.00.

*Members are asked to take careful note of the paragraph above entitled "Addresses" and to address all communications accordingly.*

*Make all checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."*

For non-Esperantist readers of the *Review*, we are presenting a series of articles in English about the language itself. These are not intended to serve as a substitute for guided study. They will, however, give you an understanding of why almost a million persons individually signed a petition to the UN, asking that the nations of the world unite in promoting the teaching and use of the international language, Esperanto. We sincerely hope that you like the *Review* and its "granda ideo". *The Editor*

## The North American Esperanto Review

(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)

Vol. 4, No. 1.

Jan.-Feb. 1956.

The *Review* not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

### CONTENTS (English)

Wouldn't It Be Nice . . . ? . . . . .	Page 1
The Flexible Language . . . . .	2
Prefixes and Suffixes . . . . .	3
The Language That's Fun . . . . .	4
For Teachers . . . . .	6
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto . . . . .	Inside Back Cover

### ENHAVO (Esperanta)

Nova Estrarestro por ELNA . . . . .	Paĝo 5
Por Korespondemuloj . . . . .	7
En Intereso de la Vero (D-ro Lapenna) . . . . .	8
Ĉu Tutmonda Movado? . . . . .	11
Adresaro . . . . .	14
Universala Kongreso . . . . .	14
Esperanto en Norda Ameriko . . . . .	15
Nova Konkurso . . . . .	16
Por Rimistoj . . . . .	16

# *The* NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 4

Jan.-Feb., 1956

No. 1

## Wouldn't It Be Nice



**I**F you could tune in any radio station in the world and understand the program?

**I**F you could travel in any country and talk freely with the people there?

IF you could correspond with anyone in the world who was interested in your hobby, your line of work, your research project — or your plan for a better world?

IF your kids earning (and, brother, I *do* mean *earning*) their foreign language credits in school were learning the same language other kids all over the world were learning?

IF the kids could learn to read, write *and speak* this language in the time they now take to learn "All Gaul is divided into three parts . . . and maybe, if all Gaul had been united, I wouldn't have to study this horrible Latin.?"

IF the statesmen trying to solve the problems of the world could listen to one another, instead of listening to interpreters?

IF, in short, the world would adopt the international language, Esperanto, as *the* auxiliary language, to be taught to all school kids (and to all adults who wanted to learn it)?

**Maybe then we'd get somewhere, huh?**

# The Flexible Language

**W**OULDN'T IT BE NICE . . . if just one new word learned added several to your vocabulary?

It does if you use Esperanto.

First, when you learn a word root, you simply add *o* for the noun, *a* for the adjective, *e* for the adverb, *i* for the infinitive, *as* for present tense verb, *is* for past tense, *os* for future, *us* for conditional, or *u* for imperative.

(See complete grammar, inside back cover)

EXAMPLE: word root *san-*; health, *sano*; healthy, *sana*; healthily, *sane*; to be healthy, *sani*; is or are healthy, *sanas*; was or were healthy, *sanis*; will be healthy, *sanos*; would be healthy, *sanus*; be healthy! *sanu!*

Second, from one basic word you can often make several related words by using the convenient table of prefixes and suffixes on the opposite page.

To continue our example: sick, *malsana*; sick person, *malsanulo*; to become sick, *malsaniĝi*; to get well, *resaniĝi*; to cure, *resaniĝi*; etc.


In English, we use the same process to some extent — as in beauty, beautiful, beautification. *But* — you cannot apply these modifications consistently. You do not make *dignitify* from *dignity*. And *mortification* is not necessarily the work of a *mortician*. So, in English, you must learn each word separately. In Esperanto, you use these transformations consistently to form related words. What you can do to one Esperanto word you can do to any other, as long as the result makes clear sense and expresses your idea.

The same process is used in combining word roots as in using affixes. Any combination that makes clear sense and expresses your idea is good Esperanto.

For example: in, *en*; to go, *iri*. Hence: entrance (act of going in), *eniro*.

entrance (place for going in), *enirejo*.

Try reading a little Esperanto, using the tables of grammar and affixes. Guess at words you don't know. If the result makes sense, you've probably guessed it right.



Flug-ant-a Teler-o

Last-a-temp-a-j inform-o-j pri prepar-o-j por send-i esplor-a-n satelit-o-n al ekster-atmosfer-a spac-o instig-as rim-aĉ-o-n:

To use Esperanto would free us  
For worldwide exchange of ideas.  
It would make us appear  
To be logical, dear,  
When folks come from Venus to see us.

● **ESPERANTOFONO** is the new 45 rpm unbreakable phonograph record which contains a detailed presentation of the phonetic system of Esperanto both by individual sound and by connected sentences of prose and poetry. Prose spoken by Prof. Dalmau, member of the Academy of Esperanto; poetry (*La Espero* and *La Vojo*) declaimed by Catalan poet Vila. Complete price only \$2.98 including postage and printed text of contents. Allow about 4 weeks for delivery. Order now from R. C. MARBLE, P. O. BOX 2081, VAN NUYS, CALIF. or direct from BELPOST, APARTADO 5164, BARCELONA, SPAIN.

# Table of Prefixes and Suffixes

SEE NEXT PAGE "The Language That's Fun"

- bo-* relative by marriage. *bofrato*, brother-in-law; *bofilo*, son-in-law.  
*dis-* separation. *disdoni*, to distribute.  
*ek-* beginning, sudden or brief action. *ekbrili*, to flash; *ekiri*, to start out.  
*eks-* as English *ex-*. *eksedzo*, former husband.  
*fi-* shameful, contemptible. *fikomercisto*, a swindler.  
*ge-* both sexes together. *gepatroj*, parents.  
*mal-* direct opposite. *malbela*, ugly; *mallonga*, short.  
*mis-* wrong, as English *mis-*. *miskompreni*, to misunderstand.  
*re-* return, repetition. *reveni*, to come back.
- aĉ* disparagement, scorn. *domaĉo*, a shack; *hundaĉo*, a cur.  
*-ad* continued or repeated action. *vizitadi*, to frequent; *ridado*, laughter.  
*-aĵ* thing characterized by . . . . *sendaĵo*, a shipment.  
*-an* inhabitant, member or partisan of . . . . *samideano*, a supporter of the same idea.  
*-ar* a collection, group. *arbaro*, a forest; *homaro*, humanity.  
*-ebl* possibility. *videbla*, visible.  
*-ec* abstraction. *rapideco*, speed.  
*-eg* augmentation. *varmega*, hot.  
*-ej* place for . . . . *lernejo*, a school.  
*-em* tendency to . . . . *studema*, studious.  
*-end* needing to be . . . . *respondenda*, requiring an answer.  
*-er* item, unit of a collective noun. *monero*, a coin.  
*-et* diminutive. *monteto*, a hill.  
*-id* offspring or descendant. *katido*, a kitten.  
*-ig* to cause to be . . . , cause to do . . . . *plenigi*, to fill; *revivigi*, to revive.  
*-iĝ* to become . . . . *ruĝiĝi*, to blush.  
*-il* implement. *razilo*, a razor.  
*-in* feminine. *onklino*, an aunt.  
*-ind* worthy of . . . . *admirinda*, admirable.  
*-ing* holder for one object. *kandelingo*, a candlestick.  
*-ism* as English *-ism*. *katolikismo*, Catholicism.  
*-ist* one professionally or habitually occupied with . . . . *kantisto*, a singer.  
*-obl* multiple. *duobla*, double.  
*-on* fraction. *triono*, one third.  
*-op* numeral collective. *kvarope*, by fours.  
*-uj* container for . . . . *cindrujo*, an ashtray.  
*-ul* person characterized by . . . . *saĝulo*, a wise man.  
*-um* indefinite suffix used where no other quite fits. *ventumi*, to ventilate.

---

Any of these prefixes and suffixes may be used as a separate word root. Simply add the appropriate grammatical ending. Examples: *eta*, tiny; *male*, on the contrary.

# The Language That's Fun

**M**OST Americans have at some time been addicted to jigsaw or crossword puzzles. How would you like to learn a language that combines the most interesting elements of both?

Try ESPERANTO!

You don't have to fit the words to the spaces, but . . . an adjective, meaning "friendly, (*amica ble*): *amika*. "Speedy" (*rapid*): *rapida*. "Corn" (*maiz e*): *maizo*. Or it may be part of a related word "house" (*dom icile*): *domo*. "Man" (*vir ile*): *viro*.

Jigsaw puzzles? Phooey! They're not in the same class with the trick of analyzing, or of putting together, some of the seemingly complicated Esperanto words. ("Seemingly," because it's simple when you once get the knack of it.)

Read (better yet, memorize!) the complete grammar of Esperanto on the inside back cover of this issue. Read, and then constantly refer to, the table of prefixes and suffixes on page three. Particular attention to Rule No. 11 of the grammar.

"O.K." Oil up your imagination and go ahead.

*Samideano*, (the word that Esperantists use in speaking to or of one another). Remember to start from the end of the word. *Sam-ide-an-o* . . . a noun indicating a supporter or partisan of—the same—idea. *Homaranismo* . . . (The ideology of Dr. Zamenhof, founder of Esperanto.) *Hom-ar-an-ism-o* . . . a noun indicating the ideology of—a supporter of—the whole group of—man as a human being.

Now try putting them into English!

Let's try it in reverse: The inhabitants of a city—a noun, *o*—the whole group of, *ar*—inhabitant of, *an*—city, *urb*. Put them together: *urbanaro*.

Incidentally, stop in the middle of that word, and put an *a* on it. *Urbana*—an ad-

jective describing—an inhabitant of—a city; English, *urbane*.

In studying Esperanto, you get a lot of interesting sidelights on English. That's part of the fun. In translating the English infinitive "to jail," I came up with *en-karcer-ig-i*. Only then did I think of the English word "incarcerate."

Of course, the mistranslations, and the boners you pull, can be fun, too! When I started learning Esperanto, I had only the lesson book and an Esperanto-English dictionary about the equivalent of the five-cent "Key to Esperanto." (Them was depression days, brother!) But I did a lot of indiscriminate reading on the side. In an article on international politics, I ran into the word *sendoganeco*. I divided it: *sen-dog-an-ec-o*. *Dog* was new to me! I looked it up: "A large dog, mastiff." I know that politicians are peculiar, but I couldn't see why one should use: "a noun indicating—the abstract idea of—a partisan of—without—a mastiff" in a serious discussion of international affairs.

When I got to class, I looked in the big dictionary (the one that sells for eighty-five cents now!) and found *dogan*—custom duties. So my "mastifflessness" became "free trade!"

The real fun of Esperanto, though, comes when you start using it. I think all students of Esperanto should begin corresponding abroad as soon as possible . . . not more than two or three months after starting. I sent off my first letter less than three weeks after my first contact with Esperanto. (Continued on page 13)

## NOVA ESTRARESTRO POR ELNA



La Estraro de ELNA elektis S-anon Dirk Brink, en San Diego, Estrarestro.

Li gvidu nin al novaj, pli grandaj sukcesoj!

Dirk Brink naskiĝis antaŭ 32 jaroj en Batavio, Indonezio, kaj travivis la plimulton el tiuj jaroj en la insuloj.

Dum la milito, kiel aersoldato de la nederlanda armeo, li fariĝis militkaptito de la japanoj, kaj lernis Esperanton en militkaptitejo.

En 1951, li forlasis Indonezion, iris al Eŭropo por mallonga tempo, tiam venis al Usono. Li organizis tre viglan grupon en San Diego, kaj estis Loka Kongresa Komitatestro por nia elstare sukcesa Kongreso en 1955.

Nia nova Estrarestro estas juna, entuziasma, kapabla. Li ne estu generalo sen armeo! Nia nordamerika movado povas esti la plej forta kaj efika en la mondo. Tia ĝi estu!

**VARBU! INSTRUU! PROPAGANDU!  
MEM ELLERNU LA LINGVON!**

**Vere Zamenhofa!  
Vere demokrata!  
Vere neutrala!  
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko**

Landa Asocio Aliĝinta al Universala Esperanto-Asocio

Ordinara membro, \$3; Geedzoj (ordinaraj membroj, sed ricevas nur unu ekzempleron de la Revuo, ktp.) \$4; Subtena membro, \$5; Patrono, \$10; Dumviva membro, \$50.

Sendu aliĝpeton kaj kotizmonon al la Kasisto: Edw. W. Pharo, Jr., 220 County Line Road, Somerton 16, Pennsylvania. Ĉekoj estu pageblaj al:

Esperanto League for North America, Inc.

## SALUTON!

Dum la pasinta jaro montriĝis ke Esperanto pli kaj pli populariĝas, pli multe da homoj aŭdas pri ĝia ekzistado, pli multe da personoj komencas la studadon.

Estas granda honoro kaj privilegio ke mi povas helpi al la fina venko en nova pozicio kaj mi esperas ke vi ĉiuj kunlaboros laŭpove.

Estas ja kompreneble ke generalo sen armeo nenion valoras, same kiel publikigado sen publiko. Pro tio mi arde petas: Donu al nia idealo iom pli da tempo ol ĝis nun. Diskonigu Esperanton dum prelegoj, varbu novajn studentojn, varbu novajn membrojn!

La Revuo estas ja organo pri kiu ni rajtas fieri. Ĝi ne estas seka nek senviva, sed altkvalita kaj viva.

Ĉiu el ni povas senpene doni mallongan prelegon pri Esperanto antaŭ la publiko. Ekzistas multego da sociaj, religiaj kaj profesiaj kluboj kiuj sopiregas je lunĉ- aŭ vespermanĝprelegisto. Kontakti tiujn klubojn kaj kunportu grandan kvanton da Revuoj (30 por \$1.00 estas donaca!) kaj disdonu la Revuojn inter la ĉeestantaro.

Jen via rezolucio por 1956.

*Dirk Brink, Estrarestro.*



D<sup>r</sup>. ZAMENHOF

## MOLOTOV UZAS ESPERANTON

La *Tacoma News Tribune*, 26 jan., 1956, prezentis longan artikolon de *Associated Press*. Ĝi menciis, (surprizo por ni!), ke Sovetunia Ministro por Eksterlandaj Aferoj V. M. Molotov antaŭnelonge sendis al japano grupo saluton en Esperanto. Post tio sekvis intervjuo kun S-ano John Leslie, Sekretario de la Brita Esperanto-Asocio.

### KIO ESTAS ESPERANTISTO?

“Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al aktiva societo esperantista estas rekomendinda, sed ne deviga.”

*Zamenhof, 1905.*

Akorde kun tiu Zamenhofa principo, la Ligo deziras helpi ĉiujn organizitajn kaj neorganizitajn Esperantistojn en Norda Ameriko.

La Esperanto-Societo de San Diego ricevis permeson de la foirestraro havi *senpagan* budon por reklami Esperanton ĉe la San Diego County Fair. Normale ĝi kostas \$175! Restas \$35 kromkostoj por elektro, ktp. Dixie Lumber Co., kiel subtenanto, jam promesis pagi tion. La foiro okazos en junio-julio, 1956.

*Fort Myers (Fla.) News-Press*, 8 nov., 1955, prezentis tre interesan artikolon pri nia malnova samideano, Arthur Brooks Baker, kiu verkis *American Esperanto Book*, estis la unua redaktoro de *Amerika Esperantisto*, kaj multe laboris por starigi nian movadon antaŭ 50 jaroj.

## LA REDAKTORO PAROLAS

### PRI LA REVUO

Ni urĝe petas, ke oni renovigu donac-abonojn. Jam delonge ni sendadas al iuj, kontraŭ 30¢ pagita antaŭ 2 aŭ 3 jaroj. Ni ne deziras interrompi la ricevadon de la Revuo, sed la Revua kaso ne povas porti tiun ekstran ŝarĝon.

## For Teachers

The Cultural Commission of the Council of Europe approved, on January 25th, the proposal made by representatives of Britain, France, Germany, Italy and Norway, that Esperanto be taught officially for one year in selected schools in Britain, France, Germany, Italy and the Netherlands, to students aged 11-14 years, and after completion of the study year the students be assembled at the headquarters of the Council of Europe (Strasbourg, France), so that the results may be reported.

Public High Schools in 2 cities in Belgium, 1 in Denmark, 2 in Germany, 2 in Britain, 3 in Finland, 2 in France, 3 in Netherlands, 1 in Austria, 4 in Sweden and 2 in Switzerland are participating in a “coordinated Esperanto course”.

The same course of 10 lessons is taught simultaneously in all schools, with arrangements for the students to start corresponding after the fourth lesson!


*from Informilo de Internacia Esperanto Muzeo en Wien.*

How about a few American schools getting in on this next year?

How about it, teachers? Most of us learn Esperanto without a teacher, or from an amateur. (I started teaching before I finished my beginners' course.) Professional talent is badly needed. Send \$3 deposit to Esperanto Library, Middleton, Wis., for the Nelson kit (textbook, 2-language dictionary, 2 readers). Send exercises to Mr. Louis Dormont, 123 East 35th St., Brooklyn 3, N. Y. Complete the course in 3 months, and your \$3 will be refunded. The books will be yours as a gift from the organization. **TEACHERS ONLY.**

The first teacher to complete the special teachers' course was Miss Abbie E. Mills, 1965 West First St., Bend, Oregon.





## KORESPONDA SERVO

Senpaga

Mondskala

Tutmondaj Gesamideanoj:

Mi estas je via dispono por havigi al vi kiel eble plej rapide taŭgan korespondanton aŭ eĉ plurajn, se vi deziras.

Vi nur skribu al mi laŭ la jena adreso: Daniel Luez, Boulevard Brossolette, Laon (Aisne), Francujo, esprimante viajn dezirojn pri sekso, aĝo, lando, ktp., de la estonta korespondanto, kaj enmetu internacian respondkuponon maldekstre stamptan.

Pri *vi mem*, nepre indiku sekson, aĝon, kaj K (komencanto) aŭ P (progresinto) por ke mi povu kompletigi miajn listojn. Tiel, vi ne nur ricevos kiel eble plej baldaŭ adreson de korespondanto konforma al via peto, sed *via* adreso estos siavice sendita al aliaj petantoj: *tio multobligos viajn ŝancojn havi eksterlandajn korespondantojn!*

La Servo estas senpaga, krom la respondkuponon por pagi la respondan afrankon kaj la gazetaran anoncadon.

Se mi havos en miaj listoj korespondanton tian, kian vi petas, vi senprokraste ricevos lian adreson: se ne, vi iom atendu, kaj mi sendos ĝin al vi tuj kiam mi ĝin ekhavos.

**ATENTU BONE!** Nur pri Esperanta korespondado mi peradas!

Kun samideanaj salutoj,  
Daniel Luez (adreso supre)

## ESPERANTISTAJ GEPATROJ

*Bulteno Gepatra* donas interesajn kaj valorajn informojn kaj kontaktojn.

Willi Brandenburg, Wilhelmstrasse 38, Münster (Westf), Germanio.

## ALVOKO EL JAPANUJO

Nove fondita japana organizo "Esperanto-Koresponda Studrondo" serĉas por siaj membroj korespondantojn el ĉiuj landoj.

Tiuj, kiuj interesiĝas pri Japanujo kaj dezirus korespondi kun japanoj, bonvolu rapide sin turni al ĝi mallonge priskribante sin rilate aĝon, sekson, profesion, preferatajn temojn, personojn k. s. kaj zorgante pri la nepra legebleco de siaj adresoj.

Tiu Studrondo publikigos en sia 12-paĝa organo titolita "Nia Korespondo" la anoncojn de ĉiuj, kiuj deziras korespondadi per Esperanto kun japanoj, senpage dum iom da tempo.

Ĉion direktu al la adreso de ĝia Sekretario: T. Kurisu, Himonya 2-19, Meguro-ku, Tokio, Japanujo.

## DEZIRAS KORESPONDI

Kunio Kubota, Shimura Dai-I, Chugakko, Shimura-Shimigu-cho 596, Itabashi-Ku, Tokio, Japanujo (31-jara lincea instruisto kaj liaj gelernantoj 14-15-jaraj kun ĉiuj, kiuj esperas la feliĉon de la infanoj: interŝanĝi PM-ojn, bildkartojn, fotojn, infanverkaĵojn, ktp.)

Yuko Fukuda, Saga-Kenritsu-Mogakko, Nakaore, Kamitabuse-machi, Saga-shi, Saga-ken, Japanujo. 26-jara instruistino de blindul-lernejo, pri edukado de blinduloj, muziko, vojaĝo, filatelio, komparo de Esp. kaj la angla lingvo, ktp., kun ĉiuj, sed prefere blinduloj kaj blinduledukistoj el ĉiuj landoj.

# EN INTERESO DE LA VERO

S-ro G. Allan Connor, redaktoro de *Amerika Esperantisto*, aperigis en la Jul-Okt kaj Nov-Dec numeroj de tiu revuo du pliajn atakojn, en kiuj ordinara mensogoj kaj kalumnioj konkurencas kun ofendoj kaj insultoj. La kaŭzo de lia ĉi-foja ondo de histerio estas sendube la fakto, ke la Komitato de UEA en Bologna kuraĝis unuanime — kaj konforme al la Statuto — akcepti la aliĝon de ELNA.

La Sekretario de EANA, kiu jam faris tiom da malbono al Esperanto en Usono, nun larĝigas sian detruan laboron al la monda Movado. Svarmas malĝustaĵoj kaj misrepresentoj pri UEA kaj ĝiaj gvidaj instancoj. Li senĉese parolas pri “amasaj ekziĝoj”, pri “ĥaoso en UEA”, “ĥaoso en la landaj asocioj”, pri iaj “politikaj” bataladoj, kvankam ĉiuj ĉi asertoj havas absolute nenion komunan kun la realo. Sufiĉas diri, ke malgraŭ la kvazaŭaj “amasaj ekziĝoj”, UEA fakte havas en tiu ĉi jaro pli ol 20,000 membrojn, cifero ĝis nun neniam atingita en ĝia tuta historio. Estos afero de la Estraro kaj Komitato de UEA plej serioze pritrakti tiun ĉi subfosan agadon de la sekretario de EANA kaj, se necese, energie apliki la statutajn rimedojn por defendi la Movadon kaj la Asocion kontraŭ tiaj atakoj de senrespondeca individuo, vera malamiko de Esperanto.

En liaj skribaĵoj — mi ne povas tion nomi artikoloj — troviĝas tiom da malveraĵoj aŭ misrepresentoj, kiom da asertoj ankaŭ pri mi persone. Tial mi sentas min devigita — certe ne por polemiki kun la redaktoro de *AE*, por kiu tio vere estus tro da honorigo — deklari,

en la intereso de la vero, jenon al la Usona Esperantistaro:

1. S-ro C. substrekas en ambaŭ numeroj, ke Jugoslavio havas 7 komitatanojn en UEA kaj inter tiuj 7 kalkulas, evidente, ankaŭ min. La 4 landaj asocioj de Jugoslavio havas ne 7, sed 4 komitatanojn konforme al la nombro de siaj membroj kaj al la Statuto. Mi mem ne estas komitatano C, kiel erarige asertas la verkinto, sed komitatano B, reprezentanta la individuajn membrojn. Cetere, en la jaro 1949 mi definitive forlasis Jugoslavion, perdis tiuokaze por la tria fojo en la daŭro de dek jaroj mian tutan havaĵon, rezignis pri mia Universitata katedro kaj aliris la dornan vojon de rifugiĝo. De tiam mi estas sen ŝtataneco kaj havas absolute nenian rilaton kun la registaro de Jugoslavio.

2. Ne estas vero, ke mi partoprenis en la lasta milito en Jugoslavio kiel “komunista partizano”, sed estas vero, ke mi libervole, kiel ordinara civitano, ne aparteninta (kaj ankaŭ nun ne apartenanta) al kiu ajn politika partio, aliris la liberigan, senfine malfacilan militon de mia popolo kontraŭ la invadintoj de mia lando. Ankaŭ nun, malgraŭ la postaj seniluziigoj, mi estas fiero, ke mi povis partopreni en tiu batalo, kiu siatempe elvokis la admiron de la tuta libera mondo. La redaktoro de *AE* devus ne forgesi, ke la Naciliberiga Armeo de Jugoslavio estis dum la milito aliancano, eĉ tre laŭdata aliancano, de Usono.

3. La redaktoro de *AE* insulte atakas min pro mia artikolo “Sur la sojlo de nova epoko”, aperinta en la oktobra

(*daŭrigo sur sekvanta paĝo*)

*Responde al artikoloj en Amerika Esperantisto, per kiuj ties redaktoro fulminis pri "intrigoj" en UEA, D-ro Lapenna skribas al ni*

## EN INTERESO DE LA VERO

numero de *Esperanto*. Laŭ sia kutimo — la samon li faris kun la artikolo de Teo Jung en *Heroldo*, pro kio li jam ricevis bonan vangofrapon de la redaktoro de tiu gazeto — li prenis el mia artikolo nur la parton, kiu rilatas al signoj de revigliĝo de la Esperanto-movado en orienteŭropaj landoj, sed li intence ellasis ĉion, kio rilatas al la atingoj de Esperanto en Okcidento. Per tio li deziras doni specialan koloron al mia artikolo, kiu havis la celon koncize skizi la situacion kaj perspektivojn de Esperanto komence de la nova laborsezono. Mi konsilas al ĉiu esperantisto relegi tiun artikolon por mem konstati ĝis kiu punkto povas iri la malico.

4. S-ro C. diras, ke la "ĝeneva spirito" "dekomence montriĝis kiel nur ruĝa fantomo". Tiu aserto aŭ montras kompletan politikan analfabetismon de la skribinto, aŭ malkovras novan mallicon. La esprimon "ĝeneva spirito" ne elpensis mi, sed pri ĝi skribis la tuta demokrata gazetaro de la mondo. Por mi kiel esperantisto tiu "ĝeneva spirito" estis kaj estas interesa tiom, kiom ĝi promesas malstreĉiĝon de la tensio en interŝtataj rilatoj kaj plivigliĝon de la internaciaj kontaktoj inter ordinaraĵoj, do kreon de pli favora grundo por la laboro por la Internacia Lingvo. Eĉ komencanto en la Esperanto-Movado hodiaŭ espereble komprenas, ke la progresado aŭ stagno en la disvastiĝo de Esperanto multrilate dependas de la grado de vigleco kaj denseco en la internaciaj kontaktoj de ordinaraĵoj. Cetere, se vere la "ĝeneva spirito" estas nur "ruĝa fantomo", tiam en la kreo de tiu "ruĝa fantomo" certe ne

partoprenis mi, sed la ĉefoj de registaroj, kunvenintaj en Ĝenevo, do, inter la aliaj, ankaŭ la Prezidanto de Usono. Vere estus tempo ke oni ĉesu skribi stultaĵojn!

5. Mi lasos flanke ĉiujn personajn ofendojn kaj insultojn, kiujn donis al mi S-ro C. kaj kiuj montras, milde dirite, ke tiu sinjoro antaŭ ol fariĝi sekretario de landa asocio estus devinta preni kelkajn lecionojn pri elementa edukiteco. Mi haltos nur je lia aludo sub citosignoj pri mia "rolo en UEA". Pri tio li skribas en ruze aranĝita kunteksto kun la celo subkomprenigi kaj sugesti ion teruran. En UEA mi havas kaj plenumas laŭ mia ebleco precize tiun rolon, kiun donas al mi la Statuto, la regularoj kaj la instrukcioj de la Komitato. Pri miaj laboro kaj aktivecoj en la Asocio kaj en la Movado ĝenerale scias, aŭ almenaŭ povas scii, ĉiu esperantisto, ĉar pri tio regule aperas raportoj kaj informoj. Tute speciale tiujn aktivecojn bone konas la multnombraj kaj sindonaj kunlaborantoj de CED, de la informaj fakoj kaj de la eksteraj rilatoj, inter kiuj troviĝas la plej elstaraj esperantistoj en la mondo. Pri mia laboro povas juĝi la tutmonda esperantistaro. Pri ĝi juĝos ankaŭ la historio.

Kiel ordinara esperantisto mi ĉiam komprenis kaj komprenas mian rolon en la Movado kiel devon labori por la Internacia Lingvo kaj laŭ miaj modestaj fortoj defendi ĝin kontraŭ ĉiuj atakoj tute egale ĉu ili venas de tiu aŭ de alia flanko. Tiel mi ankaŭ komprenas la neŭtralecon de la Asocio. Kvankam UEA estas kaj nepre devas esti politike

*(daŭrigo sur sekvanta paĝo)*

## En Intereso de la Vero *(daŭrigo el antaŭa paĝo)*

plene neŭtrala, tamen, laŭ mia opinio, tiu neŭtraleco ĉesas precize tie, kie komenciĝas la rektaj atakoj kontraŭ Esperanto fare de kiu ajn politika movado, partio aŭ grupo. Precize tiel mi ĉiam agis, skribis kaj parolis — kaj la samon mi faros en la estonteco — en mia tuta poresperanta laboro. Tial mi persone havis kaj havas negativan starpunkton rilate ĉiujn politikajn reĝimojn, kiuj malpermesas la Internacian Lingvon. En tiu senco mi skribis grandan nombron da artikoloj, kies esenco povas mallonge resumigi en la konkludaj vortoj de la verko “La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto”, kie mi diris sur la paĝo 174:

“Ne estis hazardo ke la reĝimo de Hitler per la fama Dekreto de Martin Bormann en junio 1936 malpermesis Esperanton kaj la Esperanto-organizaĵojn en Germanujo. Ankaŭ ne estis hazardo, ke en ĉiuj landoj, kiujn subpremis la nazia boto, la Esperanto-Movado ĝisvivis la saman sorton. Ne estas, fine, hazardo, ke laŭ la dekreto n-ro 0054 de la 28a de novembro 1940 de la popolkomisaro pri internaj aferoj en Litovujo, la esperantistoj estas konsiderataj kiel elementoj “kontraŭsovetaj kaj socie fremdaj” (p-to j. de la Dekreto). Ĉio ĉi klare montras kiel forta kaj granda estas la idea valoro de la Internacio Lingvo. Estas nur bedaŭrinde, ke tion vidas pli bone la malamikoj de la Internacia Lingvo kaj de la ideoj esence ligitaj al ĝi, ol tiuj, kiuj pro sia

ŝincera deziro al internacia kompreniĝo kaj monda paco devus esti ĝiaj naturaj amikoj.”

Tia estas mia starpunkto. Kaj tia ĝi restos.

6. En tiu tuta kampanjo la plej doloriga por mi estas la malbono, kiun oni kaŭzas al la intereso de Esperanto. La pli ol bedaŭrinda vero estas, ke jam plurfoje en la historio de la Esperanto-movado — kutime en la periodoj de atingitaj sukcesoj kiuj promesadis novajn venkojn — iu speco de individuoj detruadis la longjaran laboron de multaj sindonaj esperantistoj kaj per siaj senrespondecaj agoj forigis el niaj vicoj la plej agemajn batalantojn. Pri tiu kategorio de “esperantistoj” d-ro Zamenhof diris:

“Per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava sociala problemo, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi.”

Ni esperu, ke la bona laboro de ELNA sukcesos baldaŭ restarigi en Usono la dignon de la Esperanto-Movado, kiun ĝi riskas perdi pro la “erara agado de kelkaj ‘esperantistoj’”, por citi frazeron el la bulteno de la Esperanto Klubo en Washington.

*D-ro Ivo Lapenna*

## Ĉu via urbo havas UEA-delegiton?

*Ĉef-Delegito por Usono:* D.E. Parrish, 328 W. 46 St, Los Angeles 37, California.  
*Por Kanado:* W.D.B. Hackett, 362 Soudan Avenue, Toronto 7, Ontario.

# ĉu tutmonda movado, ĉu ekskluziva klubo?

La redaktoro de *Amerika Esperantisto*, en la numero Novembro-December, 1955, ree "forvagas el la rezervejo kaj aliras la militvojeton". Li atakas la Universalan Esperanto-Asocion, S-anon Lapenna, kaj ĉiujn el ni, kiuj ĝojas pri la revigliĝo de la Esperanto-movado en komunistaj landoj kaj esperas ke la tieaj gesamideanoj baldaŭ revenos al nia tutmonda neŭtrala poresperanta movado. Vere, ŝajnas ke "ĉiuj mispaŝas escepte de nia Georgo."

La artikolo citas kelkajn diraĵojn el *Sennaciulo*. Sed la redaktoro (de *AE*) enmetis tiom da propraj "klarigaj" komentoj, ke nezorga leganto ne facile rimarkus la fakton ke ili estas plejparte nur rutinaj esprimoj de espero pri reviviĝo de la Esperanto-movado en landoj, kie ni dumlonge ne sukcesis.

La redaktoro de *AE* ankaŭ (ĉu tio estas lia koncepto pri redaktora honesteco?) ellasis vortojn, frazojn kaj frazpartojn, por tiel tordi la citaĵojn ke li povu uzi ilin.

Fakte, post lia manipulado, la "citaĵoj" ne plu estas citaĵoj. Sed ili prezentas tre interesan bildon pri la pensado de la citanto. S-ano Popovic mencias ke la ĝenerala Esperanto-movado estas neŭtrala. Post la vorton "neŭtrala" la redaktoro enmetas la "klarigan" vorton "teorie". Li egaligas la vortojn "progresema" kaj "socialista" al "komunista". Li prezentas kiel pruvon pri "ruĝa intrigo" la fakton ke S-ano Lapenna ĝojas pri novaj sukcesoj por nia afero en Orienteŭropo.

Pri unu afero, tamen, la redaktoro de *AE* kaj tiu de la *Revuo* tute konsentas. Alia redaktoro tro entuziasme diris pri S-ano Lapenna: "Ni devas fari la promes-

on aŭskulti sendiskute liajn konsilojn kaj liajn petojn." Mi citas tutaprobe la komenton de *AE*: "Sed ni, respondecaj al libereco kaj historio, ja devas diskuti liajn konsilojn kaj petojn." Ĉu la redaktoro de *AE* siavice konsentos mian opinion, ke ni ja devas fari tion pri ĉiuj gvidantoj?

Nu! Mi ĉiam kredis, ke la baza celo de nia movado estas interkomprenigi ĉiujn popolojn, ĉiujn homojn, *precipe* tiujn, kiuj havas malsamajn mondkonceptojn.

Mi esperas, ke ne multaj gesamideanoj subtenas la ideon de *AE*: ke la neŭtrala Esperanto-movado estas nur "teorie" neŭtrala, kaj devas esti ekskluziva societo por reciproka admirado inter tiuj, kiuj jam konsentas inter si pri politikaj, sociaj kaj religiaj problemoj.

Ni elektu, kaj ni subtenu aŭ eksigu, gvidantojn tutsule sur bazo de ties laboroj por Esperanto, sen konsideri iliajn naciecojn kaj ideologiojn.

Ni diru al ili, ke nia movado ne estu ilo *por aŭ kontraŭ* iu ajn nacio, partio aŭ eklezio.

NI ESTU TUTMONDA MOVADO!



EKSKLUZIV-ISM-O

"..... Boston,  
The home of the bean and the cod,  
Where the Lowells speak only to Cabots,  
And the Cabots speak only to God."

KIAL LA VERDA STELO ESTAS  
SIMBOLO DE ESPERANTO ?

La respondo troviĝas sur paĝo 456 de la *Originala Verkaro* de Zamenhof:

Letero al *The British Esperantist*, 1911.

Karaj Sinjoroj! — Pri la deveno de nia verda stelo mi nun jam ne memoras bone. Ŝajnas al mi, ke pri la verda koloro iam atentigis min s-ro Geoghegan kaj de tiu tempo mi komencis eldonadi miajn verkojn kun verda kovrilo (la atentigo estis tute senintenca). Pri unu broŝuro, kiun mi tute hazarde eldonis kun verda kovrilo, li rimarkigis al mi, ke tio estas la koloro de lia hejmo, Irlando; tiam venis al mi en la kapon, ke ni povas ja rigardi tiun koloron kiel simbolon de Espero. Pri la kvinpinta stelo, ŝajnas al mi, ke unue ĝin presigis sur sia gramatiko s-ro de Beaufront. Tio plaĉis al mi kaj mi prenis tion kiel signon. Poste per asociado de la ideoj aperis stelo kun verda koloro.

ĈU TROVIĜAS UEA-DELEGITO  
EN VIA URBO ?

**HEROLDO**  
DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA  
ORGANO DE LA ESPERANTO-  
MOVADO

**Prezoj:**

Abono tutjara .....	\$4.00
Abono julio-decembro .....	2.00
Abono subtenanta .....	8.00
Anonceto po 25 vortoj.....	.50

**Nordamerika peranto:**

Donald E. Parrish  
328 West 46th Street  
Los Angeles 37, Calif.

**Por plezuraj horoj**

Invito al Ĉielo .....	\$1.50
Kredu Min, Sinjorino .....	1.65
Gaja Leganto per Esperanto .....	.30
Rozoj kaj Urtikoj .....	\$1.60
El la Maniko .....	1.80
Koko Krias Jam .....	1.80
Kontralte .....	1.80

Esperanto Book Service, Middleton, Wis.

**L E A R N  
ESPERANTO**

**VIA AŬTOMOBILo**

**Reklamas Esperanton**

kiam ĝi portas reklamstrion (bumper strip) ĉi tian. Fluoreska verda koloro "lumas" en la mal-lumo. Mendu po 20c, 6 por \$1 aŭ 12 por \$2. Esperanto-Societo de San Diego, Box 4367, San Diego 4, Calif.

**la  
Praktiko**  
LA GAZETO DE LA MONDPOPOLO

Monata internacia ilustrita revuo

**Prezoj:**

Jarabono (nur por kalendara jaro) kun membreco en Universala Ligo:	\$2.00
Anonceto po 25 vortoj:	.50

**Nordamerika peranto:**

Donald E. Parrish  
328 West 46th Street  
Los Angeles 37, Calif.

### THE LANGUAGE THAT'S FUN (from p. 4)

It is always easy to find correspondents in Esperanto, if you have any of the major Esperanto publications available. I recently saw an ad in one Esperanto magazine: "10,000 Japanese students of Esperanto want to correspond with all countries, on all subjects." In this issue of the REVIEW, you will find an announcement of free correspondence service. (Of course, you can't read the announcement until you have learned Esperanto. (Or can you?)

If you don't want to actually learn the language, at least try getting one of the Esperanto-English dictionaries that the Esperanto League Book Service advertises at prices from five cents up, and try your hand at dividing up words and putting them together again.

Have FUN!

*Trafa komento el Germana Esperanto Revuo*

### GAJA KANTADO

estas por junularaj rondoj, precipe por internaciaj renkontiĝoj, necesa samkiel la ĉiutaga pano por la homa vivo. Ni ofte konstatis, ke post forta kanto de la unua strofo sekvis vera "kata"-strofo, nome kompatinda murmuro aŭ tuta silento. Ĉu ni ne volas ŝanĝi tion? Facile ni povas solvi tiun problemon. Ĉiu membro aĉetu nian kantlibron "Junularo Kantas". Do:

Kantu, kantu, kamaradoj!  
Gloran estontecon havos ni:  
Estas hela la ĉiel',  
Ĉiam brilas nia stel',  
La fluanta tajdo estas nun ĉe ni.



### TUTKORAN DANKON PRO DONACOJ AL LA REVUO

Roland Barta, Denver . . . . . \$10.00

### PORTU LA VERDAŬN STELON!

### ANONCOJ


*Tarifo: \$1 ĝis sep linioj. Dek procenta rabato por du- aŭ plifojaj aperoj. Petu informon pri tarifo por pli grandaj aŭ multfoje aperantaj anoncoj aŭ reklamoj.*

### Veraj Amulet-rememorigaĵoj de Afriko

Nun estas haveblaj en malgranda kvanto amuletoj, kiuj vere protektas vin kaj donas al vi bon-sorton, se vi kredas je tio. Unu vera specimeno kaj la sendado rekte al vi kostas nur \$1. Aĉetu hodiaŭ, kiam ankoraŭ ili estas haveblaj. L. Heilberg, Poste Restante, Kitwe, Northern Rhodesia.

### 100% CERTECON

Kontraŭ ĉiuj infekt-malsanoj (gripo, kataro, tuberkulozo, kaj ĉiuj aliaj) kaŭzigitaj per aerodisvastigado donas



Aerodesinfektor-vaporigilo por \$8.00  
Evola-T oleo por aerodesinfektado,  
\$8.00 por kg. Sen odoro, aŭtomata.  
por DM 0,03 po horo

Ekzamenata de la Universitato de Muniko (Germanio), Ministère de l' instruction publique (Belgio), Instituto Higiena Kopenhago (Danmarko).

Ni serĉas reprezentantojn en ĉiuj landoj.

CHEMISCHE FABRIK BRUNO VOGELMANN  
Crailsheim Germanio

**41a Universala  
Kongreso de  
ESPERANTO  
Kopenhago  
Danlando  
4-11 aŭgusto, 1956**



La kongreso komenciĝos sabaton la 4an de aŭgusto 1956 kaj finiĝos antaŭtagmeze sabaton la 11an. En la kongresa programo troviĝos, i.a.: Interkona vespero, inaŭguro, Internacia Somera Universitato kun prelegoj de diverslandaj universitataj profesoroj pri diversaj temoj, laborkunsidoj, ĝeneralaj kunvenoj de UEA, prelegoj pri enlanda vivo, fakkunvenoj de diversaj internaciaj organizaĵoj kaj unuiĝoj, kongresa balo, oficiala fotografado, vesperaj prezentadoj: artaĵoj, distraĵoj, konkursoj, vizitoj al muzeoj, galerioj kaj aliaj interesaj vidindaĵoj, ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon de Kopenhago, solena fermo.

**KORESPONDADO:** La lingvo de la Universala Kongreso estas Esperanto. *Nepre uzu tiun lingvon* en ĉiuj korespondadoj. En ĉiuj korespondadoj nepre citu la kongreskartan numeron.

**POŝTADRESO:** 41a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago. Danlando.

**KOTIZOJ** (danaĵ kronoj):

	Ĝis	post
	31-III-1956	31-III-1956
Kongresano	43	48
Edz(in)o de kongresano	21.50	24
Junul(in)o ne pli ol 20-jaraĝa	14.50	16
Studento	21.50	24

Rabato por Individuaj Membroj de UEA: Kongresano, 7 d. kr.; edzino, 3.50.

Petu pluajn informojn ĉe Ĉefdelegitoj.  
Adresoj sur paĝo 10.

**ADRESARO**

Internacia Geografa Asocio: Ljubljana, Prazakova 12/III. 1., Jugoslavio.

Internacia Grafika Esperantista Ligo  
Homer R. Hansen (usona peranto)  
Apt. 14-B, 160 W. 174 St., New York, N.Y.

Internacia Unuiĝo por la Protektado de Infanoj: 16 rue du Mont-Blanc, Geneve, Svislando.

Esperanto Club of Washington  
Pan American Bldg., 17th and Constitution Avenue, Washington 6, D.C.

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien  
Usona peranto: W.E. Baff, 610 C St. S.E., Washington 3, D.C.

Asocio de PM kolektantoj (*La Filatelisto*)  
Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.  
(Li serĉas anstataŭanton.)

**KANADAJ PERANTOJ :**

Universala Ligo (La Praktiko)  
S-ro Chas. Roy MacDonald  
9445 Millen Ave., Montreal 12, P.Q.

KELI (Dia Regno) kaj Skolta Ligo  
S-ro F. Enskaitis, Box 78, Rodney, Ont.

Centro por Kanadaj Esperantistoj  
Box 52, Terminal A, Toronto, Ont.

Lokaj Reprezentantoj de CKE  
Harold Mason, 496 Grosvenor, London, Ont.

S-ino H. Amelin-Sild, 573 John St., Port Arthur, Ont.

W.J. Maier, 5658 Dalhousie Road, Vancouver 8, B.C.

**KOREKTO !**

D.E. Parrish, 328 W. 46 St., Los Angeles, California, estas peranto por *La Praktiko*, sed ne ĝenerale por mondfederalismo.



# ESPERANTO EN NORDA AMERIKO

Gratulon al S-ino Mary Hostettler Murray, kies anglalingva verko "They Shall Not Hurt Nor Destroy" nun aperas en librovendejoj. Eldonata de Vanguard.

En ĉi tiu rakonto pri la vivo de unu usona familio tra jaroj de paco, milito kaj ekonomia krizo, oni trovas multajn interesajn diskutojn pri sociaj problemoj. Inter ili estas forta argumento por Esperanto.

## ESCONDIDO, CALIFORNIA

La *Times-Advocate* prezentis longan artikolon (preskaŭ duonpaĝan) pri Esperanto, verkitan de Marion Sharp. Poste aperis ankaŭ mallonga suplementa letero de S-ano Chomette.

## LOS ANGELES

Ĉe la januara kunsido de la Esperanto-Klubo de Los Angeles, enoficiĝis: Joseph R. Scherer, Prezidanto; Edward Kalmar, 1a Vic-Prezidanto; D-ro Edmund A. Bartsch, 2a Vic-Prezidanto; Charles Chomette, 3a Vic-Prezidanto; F-ino Celia Winnick, Sekretariino; Elwyn Reed, Protokolisto; S-ino Germaine Chomette, Help-Protokolistino; S-ino Blanche Parker, Kasistino.

## BONAN SUKCESON AL ILI!

La januaran kunvenon ĉeestis 30 personoj. En novembro ĉeestis 40. Al tiuj, la fama germana aktorino, F-ino Hedwiga Reicher, kortuŝe prezentis monologon. La Klubo nun havas 75 membrojn. Ĉu via grupo havas tiom da vicleco?

## CHICAGO

*International Altrusan*, monata gazeto por virinoj en profesioj kaj administraj postenoj, prezentis tre bonan tripaĝan artikolon pri Esperanto. ELNAano Edith Driver Harper, en Chicago, verkis ĝin. Ŝi jam verkis 53 teatraĵojn kaj 1000 programerojn por la radio, kaj nun estas verkistino de reklamoj por televido.

## URĜA PETO!

Ni bezonas kongreslokon por la ĉijara Kongreso. La lokon kaj daton oni devos anonci en la aprila Revuo, se ĝi okazos en la frua parto de julio (la plej favora kaj favorata tempo). Sukcesa Kongreso gajnos por via grupo favoran atenton de urbaj instancoj, journaloj, ktp. Nia nova Estrarestro bone scias helpi vin por ke ĝi estu elstare sukcesa. Skribu *tuj* al: Dirk Brink, Box 4367, San Diego 4, Calif.

## SUN VALLEY, IDAHO

Lilio Chomette, denaska Esperantistino el Los Angeles, rompis kruron dum skiado. Rapide resaniĝu, Lilio!

## SAN DIEGO

La San Diego Altlernejo nun prezentas du vesperajn klasojn en Esperanto, unu por komencantoj, la alia por progresintoj.

Pli ol 30 ĉeestis la unuan Zamenhofan Bankedon en San Diego, je la 17a de decembro, inter aliaj S-ro Edmond Bordeaux Szekely el Tecate, Mexico. S-ro Petersen prezentis lumbildon pri la pasinta Kongreso, kaj oni vidis la tre bonan Esperantan filmon, Danlando.

## TECATE, MEXICO

30 gesamiceanoj el suda California en aŭtomobila karavano vizitis la kuracocentron de D-ro Szekely, malnova Esperanto-propagandisto, kaj aŭdis pri longa scienca ekspedicio al sudpacifikaj insuloj, dum kiu la ekspedicianoj el diversaj landoj lernis Esperanton por pli efike kunlabori.

## KANADO

Laŭ la plej lastricevitaj informoj, la Centro por Kanadaj Esperantistoj serĉas lokajn helpantojn en Montreal, Halifax, Ottawa, Hamilton, Regina, Calgary kaj Edmonton. Adreso: Box 52, Terminal A, Toronto.



## OR RIMISTOJ

(POETOJ NE LEGU!)

Ĉu vi kaj viaj geamikoj ŝatas festi specialajn okazojn? Ĉu vi, se mankas speciala okazo, ŝatas tutsimple festi amikecon? Ĉu vi tiam foje kantas sensencaĵojn?

Jen malnova amiko. Kantu laŭ muziko kaj ripetmaniero de "He's a Jolly Good Fellow" (aŭ tute laŭvole).

### LI ESTAS BONEGULO

Li estas bonegulo,  
Konsentas ĉiuj ni.  
Ŝi estas bonegulino, . . . ktp.  
Ili estas geboneguloj . . . ktp.  
Ni estas bonegularo . . . ktp.  
Transiris urso la monton,  
Ĉar tre scivolis li.  
La alia flanko de l' monto  
Similis al tiu ĉi.  
Ni iros hejmen matene  
Kiam brilos la sun' ĉe ni.

Laŭ mia memoro, la bonegulan parton verkis mia mortinta amiko kaj kolego en la Estraro de ELNA, Bill Adams, mem plej altgrada bonegulo. Mi aldonis la sensencaĵojn.



Vane, ja vane li kuras  
Se ĉe la Sekretari'  
Mankas ĝisdata adreso  
Por sendi Revuon al vi.

## WIN A PRIZE

### AND ADVANCE ESPERANTO

Here is how you can win it: Write a letter of not over 300 words to your local newspaper on a current news topic of interest to Esperantists and weave into it the following information: the fact that Esperanto has been given the "green light" by UNESCO, the world's highest education authority; the address of the Esperanto League for North America's Secretary, S-ro Conrad Fisher, Meadville, Pa.; the fact that membership in ELNA is open to all who want to help get the action of UNESCO implemented.

ELNA will send you a specimen letter on request.

When your letter is published, send a clipping to ELNA, care of the Esperanto League Book Service, Middleton, Wisconsin. The contest closes April first. The three best letters will be printed in the Review, and each will win a credit for \$5 worth of Esperanto books.

Tra leter-kest-o de l' redaktor-o  
Ven-as al li kaj ĝoj-' kaj dolor-o.  
Ven-as faktur-o plor-ig a al li  
Aŭ li-n ĝoj-ig-as leter-o de vi.

Mi petas vian indulgon, tamen, pri respondado. Verkado, redaktado, kompostado, presado kaj aliaj taskoj ĉe la Revuo (dum liberaj horoj mi pangajne ŝoforas buson) ne lasas al mi tempon por aliaj aferoj. Espereble, mi povos baldaŭ organizi miajn novajn taskojn tiel, ke mi havos iom da libera tempo. (*Revu, Ferd, revu!*)

*Ferd Carlson, Redaktoro*

### KOREKTO !

Nia Sekretario diris, en cirkulero al membroj, ke ELNAanoj povas aĉeti 60 ekzemplerojn per \$1. La prezo estas \$1 por 30, kaj oni devas mendi antaŭ preso.

## Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

### THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in hats, *ĉ* as *ch* in church, *g* as in go, *ĝ* as *g* in gem, *ĥ* as *ch* in loch, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in azure, *s* as in so, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

### THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple, *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *si*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

*-us*; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.


12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those which the majority of languages have taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.

**JUST PLAIN**  
It's the language of the future  **SENSE** Learn Esperanto now!

ESPERANTO-BY-MAIL, 123 East 35th Street, Brooklyn 3, N. Y.

---

## al Kopenhago?

AL EŬROPO?

IEN AJN EN LA MONDO?



Aĉetu viajn biletojn ĉe:

**DAVIS TRAVEL SERVICE**

6524 Van Nuys Blvd.

Van Nuys, California

Telefonoj: Stanley 5-7913 aŭ State 6-5010. Esperanto parolata!

Unu telefonalvoko aŭ unu vizito sufiĉas por ĉiu vojaĝo.

Menciu ke vi vidis la anoncon en la Revuo!

*Sincere, J.S.Davis*